Baltiaj Esperanto Tagoj
ŠIAULIAI

# SAGISTO

Redakcia retadreso: **ds@esperanto.lt**
http://www.esperanto.lt/

ĈIUTAGA INFORMILO DE **BET-43**

**N-RO 2** | 2007 07 15, DIMANĈO

## SALUTMESAĜOJ

Karaj partoprenantoj,



La organizantoj de via aranĝo havis la ĝentilecon peti min pri saluto al vi, kaj tion mi faras tre volonte. Kial mi faras tion tre volonte? Estas multaj kialoj, sed mi diru al vi nur du el ili.

Unue, mi aparte ŝatas ĉi tiujn baltajn landojn. Mi ne scias kial, sed eble pro tio ke ili kombinas en tre alta grado la hejmecon de la sudaj landoj kaj la ordon de la nordaj landoj. Eble temas nur pri impreso, sed mi daŭre reekhavas ĝin kiam mi hazarde retroviĝas en unu el ĉi tiuj landoj.

Due, mi aparte ŝatas viajn aranĝojn, ĉar vi kapablas daŭre organizi aranĝojn por esperantistoj samtempe altnivelajn sed ankaŭ ĝueblajn fare de ni, la simplaj esperantistoj, kiuj iom enuas post tro multaj kaj tro longaj gravaj prelegoj.

Ankaŭ pro tio mia saluto ne estos longa.

Mi volas transdoni al vi nur unu koncepton: Esperanto kaj la batalo por lingva justeco kaj multlingveco en la mondo estas hodiaŭ ankoraŭ pli grava ol ĝi estis en la antaŭa tempo.

Nun ni estas fariĝantaj ĉiuj indiĝenoj. Indiĝenoj estas, laŭ la nunaj ideoj en la internacia komunumo, grupoj, kiuj loĝas en sia teritorio de longa tempo sed troviĝas en ekonomie, socie kaj kulture dependa pozicio. La teritorioj, en kiuj indiĝenoj loĝas, estis antaŭ longa tempo ĉirkaŭitaj de pli potencaj fremduloj.

La tuta mondo en la nuna momento riskas iĝi "indiĝena". Homo naskiĝinta en Italujo, aŭ en Litovujo, kaj daŭre vivinta en ĝi ne havas pli da decido-povo pri sia destino ol foraj multnaciaj kompanioj, kiuj decidis kion li devas manĝi kaj kion li devas rigardi en la televido, kaj kion li devas legi, ktp. Tiuj kompanioj eĉ ne diris al li, kion ili decidis, kaj ili tute ne respondecas al li sed nur al siaj akciuloj.

Praktike ankaŭ tiu italo, aŭ tiu litovo, aŭ la homoj en ĉiuj aliaj landoj, iĝis indiĝeno de la mondo.

Kontraŭ tio ankaŭ nia amata Eŭropa Unio ne povas fari multon. Ni mem devas ribeli kontraŭ la procedoj, kiuj indiĝenigas nin.

**Renato Corsetti**
**Prezidanto de UEA**

Estimataj partoprenantoj,

Kun plezuro mi salutas la inaŭguron de la 43-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj kaj deziras plenan sukceson al tiu ĉi elstara aranĝo, kies firman enradikiĝon en la vivo de la Esperanta movado plej klare esprimas ĝia aktuala vicorda numero.

BET-43 omaĝas la 80-jariĝon de la organizita Esperanto-movado en Siauliai. Tial mi volas aparte saluti la esperantistojn de la gastiganta urbo gratulante ilin pro la jubileo kaj dezirante al ili multajn sukcesojn kaj daŭre renoviĝontan entuziasmon en ilia agado por la Internacia Lingvo.

Kun admiro mi konatiĝis kun la programo de BET-43, kiu impresas al mi kiel tiu de Universala Kongreso en kristaligita formo — kun unu escepto, nome la Somera Universitato de BET estas eĉ pli ampleksa ol ĝia frata aranĝo en la ĉi-jara UK! Ne povante mem partopreni mi sincere envias vin pro la riĉa programoferto kaj varme rekomendas, ke vi efike utiligu tiun ŝancon por kleriĝi kulture, lingve kaj movade, samtempe ĝuante belaĵojn de la ĉirkaŭaĵo kaj agrablan kunestadon kun aliaj gesamideanoj.

Esperante mem foje esti kun vi en BET, mi varme invitas vin venontjare al UK en Roterdamo por festi la 100-jariĝon de nia komuna Universala Esperanto-Asocio!

**Osmo Buller**
**Ĝenerala Direktoro de UEA**



Estimataj esperantistoj de Baltiaj landoj,

Mi salutas Vin okaze de la 43a renkontiĝo al tradicia festo de Baltiaj Esperanto-Tagoj.

Kreinto de Esperanto Ludoviko ZAMENHOF estas proksime ligita al nia lando. Tial por ni estas precipe agrable, ke Baltiaj esperantistaj renkontiĝoj estas aranĝataj en Litovio. Ni ankaŭ bone memoras antaŭ du jaroj en Vilnius okazintan tutmondan esperantistan kongreson, en kiu partoprenis ĉirkaŭ 3000 sciantoj de Esperanto el 70 landoj. Kreinto de Esperanto revis, ke tiu ĉi lingvo portos al la mondo pacon kaj instigos la popolojn ami unu la alian. Tiuj ĉi esperoj dume neplene realiĝis, tamen agado de esperantistoj sendube donas signifan impulson al la reciproka kompreno kaj kunlaboro de la popoloj.

Mi bondeziras al partoprenantoj de Baltiaj Esperanto-Tagoj sencohavan kaj enhavoriĉan agadon, interesajn aranĝojn, novajn konatiĝojn, varmon de komunikado.

La 14-an de Julio, 2007

Viktoras MUNTIANAS
Prezidanto de Litovia SEJMO (parlamento)

## Gravaj informoj pri la ekskursoj

Oni devas nepre registriĝi por la ekskursoj (precipe por la tuttaga kaj por la ĵaŭdaj kaj vendredaj duontagaj)
**ĝis la 17a horo hodiaŭ** (dimanĉe).
Samtempe oni devas pagi
la anoncitan sumon.

Sinjoro Prezidanto, estimataj Gekongresanoj, karaj Litovaj kaj Baltlandaj Geamikoj, kunvenintaj en Siaulai okaze de la tradiciaj Esperanto-Tagoj.

Mi salutas vin sincere, bedaŭrante ne povi ĝui kune kun vi la etoson de viaj debatoj, tamen ĉeestante almenaŭ virtuale, inter la personoj kaj en la lando ilin gastiganta, ambaŭ same proksimaj al mia koro. Lando, kie mia Avo startis iam sian kuracistan karieron, kie, kuracante malsanulojn, Li samtempe rafinis sian kuracilon kontraŭ la homara malsano, la projekton de lingvo internacia.

En via Lando Li trovis Klaran, la fidelan kompanionon de Lia vivo kaj de Liaj penoj; en via Lando vivis kaj laboris Aleksandro, la unua sponsoro de Esperanto, en kies hejmo la Litova Esperanto-Asocio trovas nuntempe sian sidejon.

Paralele, mi mem sentas min ankaŭ persone ligita al la Lando kaj al la Balta Regiono. En Druskinikai, sur la bordo de Nenumas, estinte juna knabeto, mi pasis neforgeseblajn feriojn. Sesdek jaroj pli malfrue, en la sama loko, miaj diskutoj kun Romano akuŝis lian koncepton de "La Zamenhof-Strato", kies esperanta versio sekve en Kaunas estis eldonita. Aliflanke, la Balta Maro estis la maro de mia infaneco; i.a. tra tiu maro mi iam ŝipveturis al mia unua Esperanto-Kongreso, okazinta en Stokholmo en la jaro 1934!

Pro ĉiuj tiuj kaŭzoj mi sentas min daŭre ĉeestanta la Baltajn Esperanto-Tagojn, al kiuj mi forte deziras plenan sukceson kaj vastan eĥon ene kaj ankaŭ ekstere de la Regiono.

La 14an de Julio 2007

Louis C.ZALESKI-ZAMENHOF



*Louis en la 92a UK en Vilnius*

## 15an de julio (dimanĉe)

09:00–10:00 Organizaj kunvenoj de gvidantoj kaj vizitantoj de ĉiunivelaj E-kursoj, de gvidantoj kaj prelegantoj de la Somera universitato, de gvidantoj kaj vizitantoj de aliaj konstantaj programeroj
*Aŭditorioj 7 kaj 17*

10:00–11:00 Malfermo de Somera universitato. Prelego de prof. Aloyzas GUDAVICIUS "Verda koloro en litova lingvo"
*Aŭditorio 7*

10:00–11:00 La unuaj lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj. Gvidas Stanislava ADOMAUSKIENE, Stanislava SOBANSKA, Nina PIETUCHOWSKA, Aldis BUŜ, Grazina OPULSKIENE
*Aŭditorioj en la unua etaĝo*

11:00–12:00 Lanĉo de nova dulingva (litove kaj en Esperanto) libro de Romualdas RUTKAUSKAS "Ruto" levis Esperon" ("Ruta" kele vilti) okaze de 80-jariĝo de la organizita Esperanto-movado en Siauliai
*Aŭditorio 17*

12:00–14:00 Tagmanĝo

14:00–15:30 "Unu Ringo ilin regas : Tolkien en Esperanto" (lanĉo de noveldonita librokolekto kaj prelegeto de Aleksander KORJHENKOV)
*Aŭditorio 17*

14:00–15:00 Baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo. Gvidas Petras CELIAUSKAS
*Aŭditorio 10*

15:00–16:00 Prepariĝo por solena inaŭguro de BET-43 kaj por diversaj aliaj programeroj

15:00–15:30 Koncerto de fakultata ensemblo "Kitava"
*Ĉefsalono*

17:00–18:00 Solena inaŭguro de BET-43
*Ĉefsalono*

18.00 – 19.00 Akcepto de Dekano de la fakultato de sociaj sciencoj (por ĉiuj partoprenantoj)
*Aŭditorio 22*

## 16an de julio (lunde)

09:00–10:00 Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj
*Aŭditorioj en la unua etaĝo*

09:00–10:30 Somera universitato. Prelego de Aleksander KORJHENKOV "Mi estas homo: pri la Zamenhofa ideologio"
*Aŭditorio 17*

10:30–11:30 Baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo
*Aŭditorio 10*

11:00–12:00 Sezonoj / La Ondo de Esperanto sin prezentas
*Aŭditorio 17*

12:00–14:00 Tagmanĝo

14:00 –15:00 Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj
*Aŭditorioj en la unua etaĝo*

14:00–15:00 Somera universitato. Prelego de prof. Aloyzas GUDAVICIUS "Genro kaj sekso en Esperanto"
*Aŭditorio 17*

15:30–17:30 Kvizo pri ĝeneralaj demandoj. Gvidas Nora CARAGEA
*Aŭditorio 22*

18:00–19:00 Koncerto de flutistino Lidija GOMOLICKAITE-GRUDZINSKAITE
*Ĉefsalono*

### Tagmanĝa Menuo dum la BET

La 15an de julio: Makaronia supo
Viandaj rulaĵoj, rizo, legomoj
Suko

La 16an de julio: Legoma supo
Kuirita prirostita porkaĵo, rizo, legomoj
Suko

La 17an de julio: Fazeola supo
Rostita fiŝo kun butero, rizo, legomoj
Suko

La 19an de julio: Terpoma supo
kun farunaj kneloj
Porkvianda rostaĵo, rizo, legomoj
Suko

La 20an de julio: Makaronia supo
Kokvianda rostaĵo, rizo, legomoj
Suko

La 21an de julio: Legoma supo
Porkviandaj pecetoj, rizo, legomoj
Suko

Unufoja tagmanĝo kostas 10 lidojn. Dezirinde estas aĉeti kuponojn por la tuta periodo.

# FOTORAPORTOJ




Jam flirtas la Esperanto-flago.



Ĉe la registriĝo



Riĉa libroservo